

7-a Azia Kongreso de Esperanto (= 14-a Israela Kongreso de Esperanto)

Tria bulteno

2013-04-18 - 2013-04-22

Jerusalemo, Israelo

Enhavo

Utilaj informoj.....	2
Aliĝo.....	2
Kongresejo.....	2
Alveno al Israelo.....	2
Tranoktado antaŭ kaj post la kongreso kaj ekskursoj.....	2
Alveno al la kongresejo.....	2
Akceptejo.....	2
Mono.....	2
Monŝanĝo.....	2
Lingvoj.....	3
Vetero.....	3
Tempo.....	3
Telefono.....	3
Kurento.....	3
Medikamentoj.....	3
Asekuro.....	3
Sabato.....	3
Koŝereco.....	3
Privizora programo.....	5
2013-04-18 ĵaŭde.....	5
2013-04-19 vendrede.....	5
2013-04-20 sabate.....	5
2013-04-21 dimanĉe.....	5
2013-04-22 lunde.....	6
Ekskursoj.....	7
Antaŭkongresa ekskurso (La Nordo): 2013-04-14 - 2013-04-17.....	7
Postkongresa ekskurs (La Sudo): 2013-04-23 - 2013-04-27.....	7
Kotizo.....	8
Detala turisma priskribo.....	8

Utilaj informoj

Aliĝo

Reta: <http://www.esperanto.org.il/ak2013.html>

Retpoŝta: ak2013@esperanto.org.il

Kongresejo

Nomo: Junulargastejo Rabin

Adreso: Nahman-Avigad-str., Giv'at-Ram, Jerusalemo (apud la Muzeo Israelo)

Telefono: +972-2-5945511

Retejo: <http://www.iyha.org.il/eng/Index.asp?CategoryID=73&ArticleID=57>

Alveno al Israelo

Se vi alvenas unu tagon antaŭ la kongreso (aŭ la antaŭkongresa ekskurso, se vi mendis ĝin) prenu aŭtobuson aŭ trajnon al Tel-Avivo; ni mendis blokon da ĉambroj en gastejo en Tel-Avivo, aŭ vi povas mendi mem en la interreto. Se vi alvenas samtage (2013-04-18) prenu aŭtobuson aŭ navetan taksion (*monit šerut* hebree) de la flughaveno rekte al Jerusalemo.

Tranoktado antaŭ kaj post la kongreso kaj ekskursoj

Ni rezervis ĉambrojn en gastejoj en Tel Avivo (2013-04-13, 2013-04-17 kaj 2013-04-27) kaj Jerusalemo (2013-04-22). Tiuj kiuj deziras uzi ilin bonvolu mencii en la aliĝilo aŭ se jam aliĝis, kontakti ak2013@esperanto.org.il.

Alveno al la kongresejo

Jerusalemon oni plej komforte atingas per publika buso de la centra busa stacidomo de Tel-Avivo (ofta; daŭro: ĉ. unu horo). De la centra busa stacidomo de Jerusalemo (daŭro: 5 minutoj taksie (ĉirkaŭ 20 NIS) aŭ 15-20 minutoj piede.

Akceptejo

Ricevu viajn nomŝildon kongresan sakon kaj ŝlosilon post pago de la restanta kotizo (por la kongreso kaj eventuala postkongresa ekskurso) en la respektivaj ĝicetoj. Pago de la tuta kotizo antaŭ la kongreso (forte rekomendita por israelanoj, eblas per UEA-konto por eksterlandanoj) ŝparos vicatendadon kiu povas daŭri longe. Surloke eblas pagi nur kontante, per eŭroj aŭ sikloj.

Mono

La israela monunuco estas la (nova) siklo (*šekel* hebree), internacia simbolo ILS (en Israelo estas uzata ankaŭ NIS; 1 siklo = 0.20 eŭroj). Ĝi dividiĝas en 100 agoroj (*agorot* hebree). Ekzistas monbiletoj de 20, 50, 100 kaj 200 sikloj; krome ekzistas moneroj de 10 kaj 50 agoroj kaj de 1, 2, 5 kaj 10 sikloj. La kaskalkuloj estas rondigataj je 10 agoroj. En la plimulto de vendejoj oni akceptas la gravajn internaciajn kreditkartojn (Visa, Mastercard, k.a.), kaj per ili ankaŭ eblas eligi el la propra konto siklajn monbiletojn el la multnombraj aŭtomatoj ĉe bankoj kaj grandaj butikcentroj.

Monŝanĝo

Krom en bankoj, eblas ŝanĝi fremdan valuton en monŝanĝejoj, kies kurzoj estas ofte pli favoraj ol la bankaj.

Lingvoj

Krom per la oficialaj hebrea kaj araba, en Israelo eblas interkompreniĝi per ĉiu pli-malpli grava lingvo (jen plago por ni, la Esperantistoj!). La rusa kaj la angla furoras, sed eblas ankaŭ france, hispane kaj per tre multaj aliaj...

Vetero

En aprilo nia mediteranea klimato estas agrabla kaj malofte pluvas. Nokte en Jerusalemo povas esti iom malvarme. En la Sudo (Morta Maro kaj Negebo), la vetero povas esti iom pli varma kaj pli seka. Por la ekskursoj portu ĉapon, sunprotektan kremon kaj sunokulvitrojn. Interne la kongresejo, hoteloj muzeoj kaj transportiloj estas klimatizataj.

Tempo

UTC + 3 horoj (kiel orienteŭropa somera tempo)

Telefono

Landkodo por Israelo: 972

Prefikso por la Jerusalema regiono: (0)2, por la Tel-Aviva regiono: (0)3, por Hajfo kaj la Nordo: (0)4, Eilat: (0)8 (la nulo uzenda nur enlande)

Kurento

La elektra tensio estas 220-volta. La ŝtopilingoj estas ĝenerale tripolusaj, sed taŭgas por dupolusaj, ĉu rondsekcaj ĉu rektangulsekcaj ŝtopiloj. Platsekcaj ŝtopiloj necesigas adaptilojn.

Medikamentoj

Se vi uzas preskribitan medikamenton, bonvolu kunporti kuracistan recepton en la latina aŭ la angla.

Asekuro

Ĉiu respondecas pri propra asekuro.

Sabato

La oficiala ripoztago en Israelo estas sabato (sed kompreneble nejudoj havas en siaj loĝlokoj siajn apartajn ripoztagojn). Ĉar laŭ la judismo la tago komenciĝas ekde la antaŭa vesperiĝo, ĉiuj oficejoj, bankoj, vendejoj (inkl. nutraĵaj) ktp. fermiĝas jam vendrede posttagmeze kaj remalfermiĝas nur dimanĉe matene (la unuan tagon de la semajno en Israelo!). Dum ĉi tiu semajnfino funkcias nur parto de restoracioj, kafejoj kaj alispekaj distrejoj. Tamen, en urboj kaj kvartaloj kun nejuda loĝantaro multaj vendejoj funkcias ankaŭ tiam. Kun kelkaj esceptoj (en nejudaj regionoj) la aŭtobusaj servoj ĉesas vendrede ĉirkaŭ du horojn antaŭ la komenco de sabato kaj reekfunkcias (ne ĉiuj) sabate ĉirkaŭ unu horon post la fino de sabato. Anstataŭ kelkaj el la aŭtobusaj linioj funkcias (ne nur semajnfine) navetaj taksioj (*monit šerut* hebree) je aŭtobusa tarifo (ŝabate pli alta). Ankaŭ la trajnaj servoj ĉesas vendrede posttagmeze kaj renoviĝas sabate vespere.

Koŝereco

En plimulto de la restoracioj kaj manĝejoj (en la hoteloj - preskaŭ ĉiuj!) en Israelo oni observas certajn manĝaĵ-rilatajn jud-religiajn regulojn de t.n. koŝereco. Tio signifas, ke

tie ne eblas mendi pladojn entenantajn viandaĵojn kaj laktaĵojn kune. Tie ne haveblas ankaŭ porkaĵoj nek marmanĝaĵoj (krom fiŝoj). Pro tio ni rekomendas, ke la dezirantoj manĝi la s.m. nekoŝeraĵojn demandu anticipe, ĉu la restoracio estas koŝera aŭ ne.

Privizora programo

2013-04-18 ĵaŭde

12:30: Komuna busvojaĝo de Tel-Avivo al Jerusalemo (de trajna stacidomo Merkaz)

* Tiuj kiuj alflugas 2013-04-18 prenu buson de la flugaveno rekte al Jerusalemo.

13:00-15:00: Akcepto kaj enĉambriĝo

15:00-17:00: Vizito en la apuda Scienca Muzeo

18:00-19:00: Prelego: Enkonduko en judajn lingvojn (Tsvi Sadan)

19:00-20:00: Vespermanĝo

20:00-22:00: Kantoj kaj dancoj kun Jomo

22:00-24:00: Esperantigita filmo: Jean de Florettes

2013-04-19 vendrede

07:30-09:00: Matenmanĝo

09:00-15:00: Ekskurso al Ein Kerem (preĝejo de la vizito), Abu Goŝ (La benediktina monaĥejo), tagmanĝo en orientstila restoracio.

16:00-19:00

Inaŭguro

Prelegoj

Ĉina Kunqu-Opero (Zhang Ping - Ĝoja)

Indonezio (Sondang Ilia Sumilfia Dewi)

De Kilimanjaro al Akonkagvo: En la spuroj de Tibor Sekelj (Amri Wandel)

19:00-20:00: Solena vespermanĝo

20:00-22:00: Koncerto de Kajto

22:00-24:00: Dancado kun Jomo

2013-04-20 sabate

07:30-09:00: Matenmanĝo

09:00-16:00: Ekskurso oriente de Jerusalemo: preĝejoj en Oliva Monto, monaĥejo kaj fonto Kelt

17:00-19:00

Debato: Nepetitaj konsiloj pri paco (Renato Corsetti)

19:00-20:00: Vespermanĝo

20:00-22:00: Komuna koncerto de Kajto kaj Jomo

22:00-24:00: Esperantigita filmo: Manon de la Fontoj

2013-04-21 dimanĉe

07:30-09:00: Matenmanĝo

09:00-16:00: Ekskurso al malnova Jerusalemo: La Templo Monto, la araba bazaro, juda kaj armena kvartaloj, Via Dolorosa kaj Tomba Preĝejo, Davidson-centro (antikva Jerusalemo), Lamenta muro kaj la Muraj Tuneloj

17:00-19:00

Publika kunveno de KAEM

Prelego(j)

19:00-20:00: Vespermanĝo

20:00-22:00: Internacia vespero

2013-04-22 lunde

07:30-09:00: Matenmanĝo

7-a Azia Kongreso de Esperanto: Tria bulteno

09:00-13:00: Vizito de la apuda Muzeo Israelo, piedira ekskurso al Kneset, la Supera Kortumo, kaj la Rozĝardeno

14:00-16:00

Prelegoj

Resumo

Fermo

Ekskursoj

Antaŭkongresa ekskurso (La Nordo): 2013-04-14 - 2013-04-17

2013-04-13: Por interesitoj ni rezervis ĉambrojn en Tel-Avivo (aldonkoste)

2013-04-14

Matene: antikva Jafo

Tagmeze: trajne al Hajfo, enhoteliĝo en hotelo "Parc Inn"

Posttagmeze: la germana kolonio

2013-04-15

Matene: promenejo Lui, la Bahaaj ĝardenoj, araba kvartalo "Vadi Nisnas"

Tagmanĝo en arabstila restoracio

Posttagmeze: karmelita monaĥejo Stela Maris

Tranokto: Hajfo

2013-04-16

Tage: Antikva Akko, markavernoj kaj klifoj "Roŝ Hanikra"

Tranokto: Hajfo

2013-04-17

Tage: Nazareto, Tiberiado kaj Lago de Galileo

Tranokto: Hajfo

Akompano: Jehoŝua Tilleman <jehoshua.tilleman@esperanto.org.il>

Kosto: 250 eŭroj

Postkongresa ekskurs (La Sudo): 2013-04-23 - 2013-04-27

2013-04-22: Ni mendis por la postkongresanoj ĉambrojn en gastejo Agron, proksima al la malnova Jerusalemo (aldonkoste).

2013-04-23

09:00: eliro de gastejo Agron

Kumran, Ein Gedi, baniĝo en la Morta Maro

Tranokto: gastejo Masada

2013-04-24

Veturo al Eilat

Survoje: vizito de salkaverno Sodomo, aventura dezerta kanjono Barak

Tranokto: Aqua Sport gastejo surplaĝa aŭ (aldonkoste) apuda hotelo Prima Music

2013-04-25

1a ebleco - Eilat: vizito de la subakva muzeo, la plaĝa korala rezervejo, la nord-plaĝa promenejo kaj butikumejo

2a ebleco - Petra en Jordanio: tuttaga ekskurso (aldona kosto de 200 eŭroj).

Tranokto: Eilat

2013-04-26

Frumatene: ebleco de subakva rifo-spektado en la Ruĝa Maro

Matene: birda stacio, dezerta besta safario Ĥajbar aŭ natura/arkeologia klif-parko Timna

Posttagmeze: Wadi Salomono kaj monto Cefaĥot (kvar-ŝtata observo)

Tranokto: Eilat

2013-04-27

Tage: la Ruĝa kanjono, reveno tra la la egipta landlimo, kratero kaj dezerta urbeto Micpe Ramon al Tel-Avivo

Tranoktado: Por interesitoj ni rezervis ĉambrojn en gastejo Bnej Dan (aldonkoste)

Akompano: Amri Wandel <amri.wandel@esperanto.org.il>

Kosto: 400 eŭroj (alternativo kun Petra 600 eŭroj)

Kotizo (por ambaŭ ekskursoj)

Inkluzivas transportadon en propra klimatizita aŭtobuso (krom en Hajfo), tranoktadon kaj matenmanĝojn, vespermanĝon en Masada, Esperanto-ĉiĉeronon, enirikostojn, kaj limtrapason al Jordanio.

Ne inkluzivas restoraciajn manĝojn, tranoktojn en la tagoj antaŭ- aŭ post la ekskursoj, kaj trinkmonon.

Detala turisma priskribo

<http://www.esperanto.org.il/dosieroj/ak2013turisma-itinero.pdf>